



PILO-PRESS

Internacia

Informservo



Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel

Postfach 2113

D-85 Nürnberg 1

Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 3/76 - 16 jan 1976
Aperas ĉiusemajne

Eŭropa Esperanto Kongreso Pasko 1976 Eindhoven Nederlando

Eindhoven (pp) - La programo por la Eŭropa Esperanto Kongreso 1976 estas nun preskaŭ kompleta.

Interesan novan programeron prizorgos Torben kaj Elisa Kehlet el Kopenhago. Kiel Pilo-Press jam raportis, Elisa kaj Torben Kehlet antaŭ nelonge vizitis la Esperanto-Kooperativon "Bona Espero" en Alto Paraiso en Brazilo. Dum la Eŭropa Esperanto-Kongreso Torben, kiu cetere estas profesia fotografisto, larĝekrane montros diapozitivajn pere de "transfluigiloj", dum Elisa rakontos, ĉio enkadrigita en brazila popolmuziko.

La kongreson ĉeestos ankaŭ la prezidanto de UEA, D-ro Humphrey Tonkin, kiu faros prelegon dum la kongresa inaŭguro.

Fare de la Urbestraro okazos oficiala akcepto sabaton, la 17-an de aprilo, en la Kultura Centro de Philips (P.O.C.).

Al la kongreso jam aliĝis personoj el dekdu landoj. Informojn kaj aliĝilojn petu de la kongresa sekretario: Floraplein 23, Eindhoven, Nederlando.

Einzi Stolz pri Esperanto

Vieno/Berlino (pp) - Pasintjare kadre de la Esperanto-elsendoj de ORF Radio Vieno s-ino Hube kantis en Esperanto kanton de la konata komponisto Robert Stolz, pasintjare mortinta. Pilo-Press raportis sietempe pri tio.

S-ino Eva Hoffmann, edzino de GEA-membro Ulrich Hoffmann, Berlin, sendis la sonbendon kun la Esperantokanto kune kun letero al la vidvino de Robert Stolz, s-ino Einzi Stolz. Per letero de la 7-a de januaro 1976 s-ino Einzi Stolz dankis al s-ino Hoffmann pro la transsendo de la sonbendo. I.a. ŝi skribis: "La Esperanto-ideo, kiu interligas popolojn, certe kontribuas por venki barojn kaj reciproke alproksimigi la homojn."

En sia letero s-ino Einzi Stolz esprimis la ĝojon pri tio, ke ORF elsendis Robert-Stolz-kanton en Esperanto, kaj skribas laŭvorte: "Eble estas ankaŭ la ebleco, ke unu aŭ la alia Radiostacio en Federacia Respubliko Germanujo disaŭdigos elsendon en Esperanto pri Robert Stolz."

Grava informo

Radio Vatikano estonte ankaŭ uzos Esperanton por siaj elsendoj. Detalojn legu sub "Esperanto en radio" !

Por legantoj en Germanlingvio

Ĉe Libroservo Ludwig Pickel, 8500 Nürnberg 1, Postfach 2113, nun estas haveblaj la Krause-vortaroj el GDR: Esperanto-Deutsch kaj Deutsch-Esperanto. Ĉiu volumo kostas 6,50 GM.

Internaciaj Someraj Universitataj Semajnoj 16-a ĝis la 30-a de julio

Paderborn (pp) - La Eŭropa Klubo organizos venontsomere en la konata Esperanto-feriejo Primošten ĉe la jugoslavia adriatika marbordo Somerajn Universitatajn Semajnoj sub la kadrotemo "Ekonomiaj rilatoj kaj scienca kunlaborado en multlingva Eŭropo." La Rektoro de la arango estas Prof. Mr. Aleksandar Hrستیć, Universitato Split; vicrektoro estas Prof. D-ro Helmar Frank, Paderborn.

La sciencan programon planas Eŭropa Kolegio, kiu konsistas el membroj de la scienca konsilantaro de la Eŭropa Klubo kaj aliaj fakaj sciencistoj de universitatoj el pluraj Eŭropaj landoj. Oni laboros en kvin fakultatoj:

- 1) Ekonomio- kaj jursciencoj (Prof. A. Hrستیć; Prof. L. Weeser-Krell; Prof. Dr. Raknić k.a.)
- 2) Klerigscienco, kibernetiko kaj interlingvistiko (Prof. D-ro Frank; Prof. D-ro Mužić; Prof. D-ro Szerdahelyi; Prof. D-ro Gerlach; Prof. D-ro Lehnert; Prof. D-ro Schmid k.a.)
- 3) Natur-, inĝenier- kaj medicinsciencoj (Prof. D-ro Jones, Prof. D-ro Weltner; Prof. D-ro Gerlach k.a.)
- 4) Estetiko kaj literaturscienco (Prof. D-ro Vrančić; Prof. D-ro Moles Prof. D-ro Maser k.a.)
- 5) Bazteorio kaj formalsciencoj (Prof. D-ro Ceccato; Prof. D-ro Laňský; Prof. D-ro La Torre k.a.)

Prelegoj kaj seminarioj okazos nur antaŭtagmeze; la posttagmezoj estas liberaj por sunbruniĝi, bani, dormi, ripozi. Fruvespere estos publikaj prelegoj. Post la vespermanĝo Internacia Kultura Servo zorgas pri kulturaj aranĝoj kaj dancadoj. Antaŭtagmeze - samtempe kun la sciencaj aranĝoj - kaj malfrue posttagmeze okazos diversaj Esperanto-kursoj, sed ankaŭ kursoj por la germana kaj kroata lingvoj.

Por la infanoj la Eŭropa Klubo kunlabore kun Kroata Esperanto-Ligo aranĝas Eŭropan Lernejon, kie la infanoj lernas kaj aplikas la lingvon resp. kie ili estas prizorgataj. La lingvokursoj jam okazas ekde la 9-a de julio

La Someraj Universitataj Semajnoj estas plurlingvaj: germana, angla, franca, itala, kroata, Esperanto. Oni tradukos el ĉiu nacilingvo en Esperanton. Oni resumos la enhavon de Esperanto-prelegoj en unu el la fiksitaj maksimume tri laborlingvoj de la koncerna fakultato.

La aliĝotizo varias inter 20 kaj 70 GM depende de la kategorio kaj aliĝdato. Fine de la Someraj Universitataj Semajnoj oni havos eblecon karavane vojaĝi al la Universala Kongreso en Ateno.

La Eŭropa Klubo preparis detalan 10-paĝan informilon germanlingvan kun traduko en Esperanto. Petu ĝin de Eŭropa Klubo, Riemekstr. 62, D-4790 Paderborn.

Esperanto-filmo el GDR

Mannheim (pp) Kiu volas prezenti la Esperanto-filmon "Hieraŭ ili estis ankoraŭ infanoj" el GDR (16 mm; 20 minutoj, Color), turnu sin al Erhard W. Matthes, Esperanto-Ranch, Herzogenriedstr. 165, D-6800 Mannheim 1.

Aŭtoro de la Jaro

Novara (pp) - La literatura rondo "La Patrolo", cele al antaŭenigo de la Esperanta kulturo kaj al kuraĝigo de la esperantlingvaj verkistoj, lanĉas konkurson sub la titolo "Aŭtoro de la Jaro".

Estos gajninto de la konkurso la verkisto, kiu - dum la daŭro de 1975a - plej multe honoris la Esperanto-literaturon per originala verkado aŭ traduko.

Esperanto en radio

Vatikana Radio uzos Esperanton

Romo (pp/ra-ro) - La ĵurnalo "Il Giornale Nuovo" de Milano publikigis, la 4-an de januaro, ĉi tiun artikolon:

"Esperanto estis aldonita de la Vatikana Radio al la pli ol 30 lingvoj, kiujn ĝi uzas depost jaroj por la elsendoj de siaj informoj. Esperanto estas uzata - laŭ la deklaroj de la estroj de Vatikana Radio - kiel bondeziro por ke la homoj de ĉiuj landoj povu pli bone kompreni kaj respekti sin reciproke, kaj ĉefe por ke ili povu ĉiam pli ami Dion nian Patron'.

Ekde 1.1.1976, la Vatikana Radio starigis novan, dumnoktan programon de du horoj, sur mezaj ondoj".

La sciigo estis prenita el la oficiala programbroŝuro de Vatikana Radio de januaro 1976-a, kiu anoncis, ke dum la nokta programo oni elsendos, de tempo al tempo, ankaŭ meditadojn kaj reklamon pri la vaticanaj elsendoj en la eŭropaj lingvoj, en la araba kaj en Esperanto.

La respondeculo, pastro Borgomeo, telefone pridemandita, konfesis, ke la decido estis alprenita pro la "insista peto de la Esperantistoj, ke oni konkludis, ke valoras la peno fari eksperimenton". Laŭ Radio Roma

1172 korespondaĵoj el 35 landoj

Romo (pp) - La Esperanto-Redakcio de Radio Roma informas:

Dum la jaro 1975-a ni ricevis, entute, 571 leterojn, kartojn, diskojn kaj sonbendojn, kaj 601 presaĵojn, sume 1172 korespondaĵojn, el 35 landoj: Germanujo (FRG) 219, Italujo 138, Francujo 133, Nederlando 90, Britujo 58, Hungarujo 52, Aŭstrujo 51, Pollando 47, Danlando 46, Finnlando 45, Hispanujo kaj Germanujo (GDR) po 30, Svedujo 27, Belgujo 25, Ĉeĥoslovakujo 23, Svidlando 21, Bulgario 19, Jugoslavio 18, Greklando 17, Japanujo 16, Ĉinio (Popola Respubliko) 13, Norvegujo 11, Sovetunio 9, Portugalio 6, Argentino kaj Kanado po 5, Monako, Kolombio, Brazilo kaj Sudafriko po 3, Rumanujo 2, Malto, Israelo, Urugvajo kaj Usono po 1.

Proporcie kun la loĝantaro, plej multaj korespondaĵoj venis, laŭvice, el Monako, Finnlando, Danlando, Aŭstrujo, Nederlando, Hungarujo, Germanujo (FRG), Svedujo, Svislando, Malto, Norvegujo, Francujo, Belgujo, Italujo, Bulgario, Greklando, Germanujo (GDR), Ĉeĥoslovakujo, Japanujo, Pollando, Britujo, Hispanujo, Jugoslavio ktp.

Ni sendas, tute senpage, ilustritan programbroŝuron en la lingvoj itala, angla, franca, germana kaj hispana (oni bonvolu diri, en kiu lingvo oni deziras ricevi ĝin), turismajn prospektojn pri Italujo, kaj flageton de nia stacio. Kun dankemo ni ricevas Esperanto-eldonaĵojn, dokumentojn kaj informojn, kiujn ni utiligas por niaj elsendoj. Ni multe bezonas korespondadon flanke de la aŭskultantoj, sed ankaŭ tiuj, kiuj ne kaptas nin, povas helpi per sendado de salutkartoj.

Radio Pekino vendrede, la 9-an de januaro, elsendis nekrologon pri la mortinta ĉefministro de Ĉinio, Ĉu En Lai kaj liston de la honora funebra komitato.

Radio Zagreb elsendis sian kutiman tripartan programon: Novaĵoj el Jugoslavio, Radian Artikolon pri konkurso por infanoj kaj raporton de M. Gjivoje pri la ĉi-jara kongreso de jugoslavijaj esperantistoj en Prilep, pri kiu Pilo-Press jam raportis en la antaŭa numero.

Radio Vieno . La ĉisemajna komentario traktis la problemon de terorismo en la mondo. Oni aŭdis artikolon pri la Vienaj filharmonistoj kaj interesan leterkeston.

Esperanto en radio (daŭrigo)

Svisa Kurtonda Servo. D-ro A. Baur prezentis la filmreĝisoron Kurt Fröh okaze de novaperinta libro "Retrorigardo". Estas interese ke ankaŭ Kurt Fröh en sia junaĝo lernis Esperanton kaj ke kun la aŭtoro de tiu libro ligas D-ron Artur Baur personajn memorojn el la gimnazia tempo. - Ges-roj Gacond daŭrigis citi el Literatura Mondo, ĉi-foje denove pri la tiama disputo pri neologismoj. Pli kaj pli la programoj de ges-roj Gacond fariĝas esperantologiaj prelegoj.

Varsovio. Ĉe la Varsoviaj elsendoj kompreneble la politikaj temoj rangas en la unua vico. Por politike interesita homo certe estas alogaj la ĉiutagaj radiaj ĵurnaloj kun aktualaj informoj, la aktualaj komentarioj kaj la panoramo de internaciaj eventoj. Momente en la fokuso estas la konflikto en Angolo kaj la Proksima Oriento. Certe el okcidenta vidpunkto oni ne povas konsenti al la opinioj kaj argumentoj esprimitaj en ĉi-rilataj komentarioj.

La ĉi-semajna trarigardo de soci-kultura gazetaro elstarigis la "heroon de la pola prozo".

La Esperanto-Ekspreso, sendube la plej ŝatata programo el Varsovio post la leterkesto kaj koncerto kun bondeziroj, ĉi-foje prezentis la novjaran mesaĝon de la UEA-prezidanto Humphrey Tonkin, intervjuon kun Hermann Behrmann pri Esperanto programita, informojn pri la Filio de PEA en Bydgoszcz, la kutiman rubrikon "Novaĵoj de Pilo-Press" kaj "Niaj aŭskultantoj sciigas". Krome ĉi enhavis kantojn de Beltono.

Kroacia Esperanta Junulara Asocio

Zagrebo. (pp) - Kiel rezulto de decentraligo de socia vivo, konforme al nuna evoluo de socio en Jugoslavio, aktivecoj por Esperanto atingas signifoplenajn rezultojn en unuopaj jugoslavaj respublikoj.

Lastatempe reorganiziĝis Kroacia Esperanta Junulara Asocio kiu post plurmonataj preparlaboroj okazigis Konstituigan Konferencon de KEJA la 12-an de decembro 1975 en Zagreb. Oni akceptis novan statuton laŭ kiu KEJA fariĝis socia organizaĵo apud nur deko da tiuj organizaĵoj en Kroatio. Ĝis nun ĉiuj Esperanto-organizaĵoj estis konsiderataj asociiĝoj de civitanoj (hobiaj asociiĝoj). Nun la agado de KEJA kaj ĝiaj celoj fariĝis socie protektataj, kio signifas ke tiun ĉi celon oni ne povas negi kaj aliflanke oni ricevas regule materian helpon por la agado.

La konferencon ĉeestis 39 delegitoj el 23 lokoj de Kroatio. La konferenco instigis fondon de novaj societoj en lokoj kie KEJA ĝis nun ne havis membrojn: Zadar, Petrinja, Slavonska Požega, Pula kaj Split.

GEA-enketo

Bad Hersfeld (pp) - Germana Esperanto-Asocio dissendis al la lokaj grupoj enketilojn por esplori la eblecojn pri prelegoj de eksterlandaj prelegantoj en tiuj lokaj grupoj.

Someraj Universitataj Kursoj

Liĝo (pp) - La 3a Sesio de Someraj Universitataj Kursoj (SUK) okazos de la 8-a ĝis la 29-a de aŭgusto 1976 en Antverpeno kun la branĉoj Biologio, Matematiko, Sociologio. Detalan programon ni publikigos en la venonta numero de Pilo-Press.

Pilo-Press: Internacia Informservo ĉiusemajna; jarabono 30,- GM, kun la germana eldono END 40,- DM. Abonpagojn oni bonvolu sendi al Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1, Postscheckkonto Nürnberg 819 56-851